

Ora Ĵurnalo

ĴURNALO, KIU NE APERAS ĈIUTAGE, SED LEGBLAS ĈIUTAGE

Numero 64, Aŭgusto 2023



Ĉu troviĝas brando en la soklo?

Magazino por kulturo kaj plezuro

Bonvolu viziti nian retpaĝon:

www.esperanto-gbg.org

Enhavo

| | | | |
|--|----|---|----|
| Enhavo..... | 2 | La monstro en la Grandlago – Odjuret i Storsjön..... | 16 |
| Pri Ora Ĵurnalo..... | 2 | Malgranda ŝterno – Småtärna..... | 17 |
| Espeporko meditas..... | 3 | La intereso pri Esperanto kompare kun pri la klimato..... | 17 |
| Statuo de la reĝo Karl IX..... | 3 | Socia evoluo?..... | 18 |
| Ekskurso la 8an de julio..... | 4 | Ŝerco inter sciencistoj..... | 18 |
| La naskiĝtago de Esperanto..... | 5 | ZEOJ..... | 19 |
| Esperanto – Ĉu eŭropa aŭ azia lingvo?..... | 6 | Supo en la benzinujo – Soppa i tanken..... | 19 |
| Tio estas vivo..... | 7 | Hökälla, societo pri kulturo kaj naturo..... | 21 |
| Kanto pri Odeso de 90aj jaroj..... | 8 | La fortifikaĵo Leono – Skansen Lejonet..... | 22 |
| Limerikoj..... | 8 | Albumo de gvidita promeno kaj ene kaj ekstere de la fortifikaĵo Skansen Lejonet.... | 25 |
| Kontraŭ apartismo kun Tanzanio..... | 10 | Saluton el Stokholmo..... | 27 |
| Lumo, revuo eldonata en Kebeko..... | 13 | Pri AI – Artefarita Inteligenteco..... | 34 |
| El Penseo, monata revuo pri poemoj..... | 15 | Kaj fine kelkaj anekdotoj..... | 34 |
| La avantaĝoj de Linukso..... | 15 | | |
| Bonaj novaĵoj de DR Kongo skribas Amnesty International, Svedio..... | 16 | | |

Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Esperanto-Societo de Gotenburgo por subteni la esperantobibliotekon en Stannum, Östadsvägen 68.

Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79, siv.burell@gmail.com kaj Ingegerd Granat, 073-502 53 32, ingegerd.granat@gmail.com.
Fina paĝaranĝo: Andreas Nordström, arendsian@hotmail.com.

Kontaktu iun el la redaktantoj kiam vi volas viziti la bibliotekon, ili malfermos al vi!

Limdato por manuskriptoj estas la 1:a en ĉiu monato. Ni deziras kontribuaĵojn pri kulturo, naturo, lingvo, vivstilo, sano, manĝaĵo kaj rakontoj en diversaj temoj.

Vidaĵo de Gotenburgo el fortikaĵo Leono, vidu p. 26.





Espeporko meditas



- Eĉ somere aferoj okazas ĉe la Esperanto-klubo de Gotenburgo. Komence de julio ni faris ekskurson al la somerdometo de Roger en la komunumo Ulricehamn, ĉirkaŭ 100 km for de Gotenburgo.
- La 26an de julio ni celebris la naskiĝtagon de Esperanto en la golfrestoracio de Lerjedalen.
- Pri Odeso ni ofte aŭdas en la TV. Tamen pli valoras la kontakto kun loĝanto de la urbo. Tatjana Anderskaja afable donis al ni permeson preni el ŝia retpaĝo.
- Carl-Olof Selenius loĝis en kelkaj afrikaj landoj. Ĉi tiun fojon li rakontas pri laboro por forigi la apartismon en Sud-Afriko – de Tanzania bazo.

- Ora Ĵurnalo bone spegulas okazaĵojn de Gotenburgo – hodiaŭ kaj hieraŭ. Tamen ne estas facile traduki malnovajn svedajn tekstojn en Esperanton. La rakonto pri la Leona fortifikaĵo donas informon pri militaj tempoj en Svedio.
 - Pri Stokholmo skribas la pastro Ragnhild Hallén kaj Ingegerd kompletigis la artikolon per kuriozaĵoj. Amuza legado!
 - La 9an de septembro komenciĝos niaj esperantokursoj ĉiun duan sabaton en Redbergsskolan. Ĉu estas intereso pri zoom-kursoj? Eble alia klubo volus aranĝi tiajn? Zoom ja ebligas gvidadon kaj partoprenon de la tuta lando. Pripensu!
- Ĝis septembro!

/Siv

Statuo de la reĝo Karl IX



Sur la unua paĝo estas foto farita de Ingegerd.

La jena estas el Interreto:

La ĉevalstatuo de Karlo la IX-a aŭ "Kopparmärra" estas ĉevala statuo en Göteborg, reprezentanta Karl la IX-an. Ĝi estis kreita de la skulptisto kaj profesoro ĉe la Artakademio John Börjeson kaj estis inaŭgurita en 1904 en la mezo de strato Östra Hamngatan ĉe Kungssportsplatsen.

Karlo la IX-a estis unu el la filoj de reĝo Gustavo Vasa kaj fondis la unuan version de

Gotenburgo en Hisingen en 1603, sed tiu urbo estis detruita de la danoj. La statuo estas gisita en bronzo kaj reprezentas virĉevalon, malgraŭ la nomo Kopparmärra (la kupra ĉevalino).

La Glavo-ŝtelo

En la nokto de la 27-an de oktobro 1977, "paro da viroj" en siaj 20-aj kaj 25-aj jaroj ŝtelis la glavon, kiun la rajdisto portis, pendante de sia kokso.

Fine de oktobro la sekvan jaron fandejo en Partille faris novan glavon, 30 kilogramojn pezan kaj 190 centimetrojn longa. /Siv

Ekskurso la 8an de julio

13 membroj de la esperantoklubo de Gotenburgo kunvenis en la somerdomo de Roger Nilsson ĉe la lago Sämsjön en la komunumo Ulricehamn.



Roger vere elektis la ĝustan tagon por la kunveno, la vetero estis bonega. Du personoj naĝis en la lago, kiu estis tute proksima al la somerdomo. Andreas promenis nin ĉirkaŭ la domo, kie troviĝis paperetoj kun ruzaj demandoj, do poenta promeno. Gratulon al Lasse, kiu gajnis.

Ĉiu kunhavis sian piknikan lunĉon – pli praktike ol aranĝi komunan lunĉon, sed kafon, bulkojn kaj torton ni kune dividis.

Iomete ni diskutis venontajn eventojn, pri la librorondo, pri la urba promeno, pri la celebros de la naskiĝtago de Esperanto, pri la aŭtunaj kursoj kaj pri nia partopreno en la Libro-foiro. Du komencantoj de la somera


kurso troviĝis inter ni – Zakia kaj Janne. Do bona komenco de la esperantaj aktivecoj la venontan duonjaron, ĉu ne?

Koran dankon al Roger – vere vi donis al ni elstaran someran memoraĵon!

/Siv

La Naskiĝtago de Esperanto

celebrita en la restoracio de la Golfklubo de Lerjedalen, Gotenburgo.



Ekster la restoracio.

Ni estis 12 personoj, sed en la bildo mankas du personoj, mi, kiu fotis, kaj unu persono, kiu venis iomete malfrue pro problemoj pri la trafiko. Christin ludis la trumpeton kaj ĉiuj kantis la esperanto-himnon. Post la ekzerco dum la somera kurso, ĝi sonis bone, kaj la golfludantoj espereble ĝuis ĝin.



Ulrika Hoppe el Stokholmo kaj Magnus el Gråbo unue venis al mi en Gråbo. Ni montris al Ulrika la esperanto-bibliotekon en Stannum.

Post la lunĉo en Lerjedalen Ulrika rakontis pri siaj spertoj de esperantokunvenoj en Stokholmo kaj eksterlande – ekz. dum la UK-oj en Kopenhago kaj Lahti. En Stokholmo oni legis kaj diskutis la libron *La Ringo* de Tolkien. Bona ideo!

Dum kelkaj tagoj ŝi nun spertis la celebron de Gotenburgo – la 400-jara jubileo de ĝia ekzisto. Samkiel dum la 300-jara jubileo, Gotenburgo devis prokrasti la celebron, en 1921 pro la hispana malsano kaj en 2021 pro la korona pandemio.

Do, kune kun Ulrika ni babilis, kantis kun akompano de la trumpeto de Christin, divenis enigmojn kaj kredis ke ni bone celebris la naskiĝtagon de Esperanto. 😊

Preskaŭ ĉiun jaron ni celebris la naskiĝtagon de Ludoviko Zamenhof la 15an de decembro. Tamen la naskiĝtago de Esperanto, kiam eldoniĝis La unua libro, la semo de la tuta Esperanto-lingvo, ja okazas la 26an de julio,

meze en la somero, kiam multaj libertempas. Dank' al Ulrika ni celebris tiun tagon. Ŝi per mejlo demandis al ni: Kie vi celebras la 26an de julio? Je tiu tempo mi estos en Gotenburgo. Hmmm, kion diri? ... ni rapide

planis la kunvenon en Lerjedalen kaj laŭ mi ĝi estis bona tago!

Koran dankon, Ulrika! /Siv



Esperanto – Ĉu eŭropa aŭ azia lingvo?

Pri eseo de Claude Piron

Walter Klag, Aŭstrio, atentigis min pri tiu eseo. Antaŭe mi, krom kelkaj romanoj kaj lernolibroj de ĉi tiu interesa verkisto, nur konis unu faklibron de Piron pri la lingvo



Esperanto – **La bona lingvo**. En tiu libro li i.a. skribis pri la ĉina lingvo, kiun li regis.

Walter Klag havas multajn interesojn, i.a. ĝardenzorgadon. Jen li en sia bieno en Stirio, kie li mezuras kiom multe la tapso plilongiĝis dum kvar monatoj – jes fakte 2,3 metrojn. Oni diras, ke bonas paroli kun kreskaĵo por ke ĝi bone kresku (pro la karbona dioksido de la elspiro?). Mi cerbumas: ĉu Walter parolis germane aŭ esperante al la prospera tapso? Kaj li ne regas la tapsan lingvon, li asertas! Ĉu ni kredu lin?

Sed reen al Claude Piron.
Jen foto de li.

Claude Piron, ankaŭ
konata sub la pseŭdonimo
Johán Valano, ja estis
svisa psikologo,
esperantisto, tradukisto
kaj verkisto.



Li estis tradukisto de U.N. de 1956 ĝis 1961
kaj poste li laboris por WHO. Li skribis pri
Esperanto kaj en Esperanto.

Li parolis Esperanton ekde infaneco kaj uzis
ĝin en Japanio, Ĉinio, Uzbekistano,
Kazakstano, en Afriko kaj en Latina Ameriko
kaj en preskaŭ ĉiuj landoj en Eŭropo.

Nun al la eseo: **Esperanto – Ĉu eŭropa aŭ
azia lingvo?**

Humphrey Tonkin, el Usono, skribis la
antaŭvorton de la eseo. – Unue li cerbumis
pri la malfacileco trovi sciencistojn, kiuj povas
kompari okcidentajn kaj orientajn lingvojn
koncerne la esperantan lingvon, kiu
pretendas esti tutmonda lingvo.

En sia antaŭparolo Tonkin, kiel respondon al
la demando, skribas: Se efektive la lingvo de
Zamenhof montriĝas firme ligita al Eŭropo,
evidente ĝia pretendo al neŭtraleco inter la
lingvoj estus grave kompromitita. Oni grave
povus tiam aserti, ke, kvankam ĝi estas pli
facila ol la aliaj lingvoj nun uzataj en la
internaciaj rilatoj, kaj do serioze konsiderebla

kiel internacia lingvo, ĝi tamen ne estas perilo
inter la kulturoj.

Sed la scienca pruvo de tiu ĉi demando kuŝas
ne en la historiaj limoj de la scio de
Zamenhof, nek en la superaĵaj karakterizoj de
la lingvo, sed en la efektivaj spertoj en la
lernado de la lingvo en diversaj mondopartoj
kaj en la profunda strukturo de Esperanto
mem. **Pliaj studoj estas bezonataj, diras
Humphrei Tonkin.**

**La eseo estas tro longa por Ora Ĵurnalo, sed
vi povus mem legi ĝin!**

La lingvo de Claude Piron estas sufiĉe facila:


https://legacy.esperanto.org.uk/eldonoj/piron/skanoj/Cxu_euxropa_aux_azia_1977.pdf

aŭ eble pli prefereble legu "La bona
lingvo" de Claude Piron? Eble la eseo
estis la grundo de "La bona lingvo".
Vi povus kompari la tekstojn:

<http://claudepiron.free.fr/livres/bonalingvo.htm>



El Interreto: *La bona lingvo* estas titolo de libro
verkita de Claude Piron. Tiun ĉi 109-paĝan eseon
eldonis Pro Esperanto en Vieno en 1989 kaj
Internacia Esperanto-Muzeo samloke en 1997
(2-a eldono) (ISBN/ISSN 3901752117). Nova
eldono aperis en 2015 ĉe Monda Asembleo Socia.



Ankaŭ troviĝas alia libro en la
sama temo: **Ĉu nur angla
Eŭropo, Defio al lingva
politiko**, verkita de Robert
Philipson.

Sukceson! / Siv

Tio estas vivo

gramatika poemo de Ingegerd

Tio estas la vivo,
tia Dio min ordonis.
Tie troviĝas ĝojo,
tial mi ĝojas.
Tiom da ĝojoj, tiom da ridoj,
tiu Dio, ties bona volo, kreis min.
Tiam mi estas feliĉa!



Kanto pri Odeso de 90aj jaroj

de Tatjana Auderskaja

Al la sudo sin direktas ŝipa ar',
Ĝis Bospor' ĉirkaŭe sternas sin la mar'.
Nek insulo, nek miraĝ' sur blua ond'...
Certe, «Estas multaj urboj en la mond'»

Rf:

La sunsubiro, la tagfiniĝo, Odes' angoras.
Ja diris Puŝkin, ke iuj mortis, kaj iuj foras.
Drinku ni pro odesanoj-geamikoj,
Kiu estas en kaj post la Atlantiko.

Sed ni restas, ni elvivas en Odes'.
Ni malsatas, frostotremas, – tamen, jes!
Iu nin malamas arde, kun envi'.
Ridas ni tra larmoj, tamen – ridas ni!

Rf.

La sun' leviĝos, la sun' leviĝos en urb' ĉemara.
Revenos kantoj, revenos homoj al panjo kara.
Longan nokton ni travivos kun honoro,
Post tenebro devas veni la aŭroro.

Rf.



La Opera Domo



La Patemkin-ŝtuparo



La katakomboj de Odesa

Odeso estas urbo en suda Ukrainio kaj la plej grava havenurbo de la lando. La loĝantaro sumiĝas al proksimume 1 miliono. La grandurbo estas nomita laŭ malnovgreka kolonio nomita Odessos.

Odessa är en stad i södra Ukraina och landets viktigaste hamnstad. Folkmängden uppgår till cirka 1 miljon invånare. Staden är uppkallad efter en grekisk koloni under antiken vid namn Odessos.

Limerikoj

de Tatjana Anderskaja

Iu person' el **Kievo**
Longe dronadis en revo.
Poste li revekiĝis,
Kaj terure timiĝis,
Ĉar okazis al revo la krevi.

Iu knabin' el **Odeso**
Falas en am' sen permeso.
Ŝi suferis kaj ĝuis,
Kun pasi' rendezuis,
Sed finiĝis ja ĉio per ĉeso...

Iu sprita rabisto el **Bresto**
Prenis kason tutplene, sen resto.
Estis en tiu kas'
De la mono amas':
Unu groŝo sur fundo de l' kesto.

Iu juna student' el **Rostovo**
Foje dormis en fremda alkovo.
Kiam venis maten'
Li rimarkis kun splen'
Ke ĉe li restis sola ĉurovo.

Iu bela virin' el **Barato**
Kredis, ke ĉiu vir' estas frato.
Post nelonga turne'
Ŝi komprenis, ke ne,
Sed ne estis por ŝi sortobato.

Brita sir' Isaak, saĝa homo,
Ĉiam timis eliri el domo.
Lin ne trafis fripon'
Tamen falis plafon'
Kaj ĝi pezis pli multe, ol pomo!

Iu **usona** virino
Volis lavi nur per lavmaŝino.
Sed... ho, kiu konfuz'!
Ne sukcesis amuz':
Estas «lavi» ne «love»! Punkto, fino.

Iu juna poet' el **Lepanto**
Enamiĝis al lingv' Esperanto.
Venis li al Kongres',
Sed – ho ve, malsukces'!
Kaj popol', kaj simbol' – por brokanto!

Iu **turka** paŝa' en haremo
Ekdeziris koiti ĝis tremo.
Sed diskuris inar',
Kaj li restis sen par'.
Venis emancipad' al haremo!



Iu virin' el **Komio**
Tre similis al mava simio.
Kaj ne nur la vizaĝ',
Bedaŭrinde la saĝ'
Sama, kiel ĉe l'besta specio.

Iu gaja drinkul' el **Torino**
Iam trinkis tro multe da vino.
En haladz' de l' ebri'
Vidis li inojn tri
En la lok' de la propra edzino.

Iu kalva person' el **Kanbero**
Promenadis en granda sombrero.
Ho, terura moment'!
Forte blovis la vent',
Kaj ekflugis li al stratosfero.

Iu frizist' el **Taŝkento**
Amindumis kun granda serpento.
Pro brakuma sufok'
Li vekigis en ŝok'...
Sed ne restis jam tempo por pento.

Bela damo el land' **Rumanio**
Serĉesploris pri biokemio.
Foje el la matras'
Tralikiĝis la gas'...
Fil' naskiĝis pro la reakcio.

Iu povra soldat' el **kazerno**
Perdis monon sub strata lanterno.
Jen briletas moner'!
Li sin klinis al ter'...
Lin akceptis profunda poterno.

Iu usonanin' el **Ĉinio**
Tre suferis pro rena hernio.
Dum futbal'-mondial'
Post triop-seks-batal'
De l' malsano jam restis nenio!

Kontraŭ apartismo kun Tanzanio

de Carl-Olof Selenius, Uppsala



Panorama de Morogoro. Morogoro estas urbo, situata en la orienta parto de Tanzanio, 196 km okcidente de Dar es Salaam. En la fono videblas la Nguru-montoj.

Ĉu mi partoprenu? La Universala Kongreso de Esperanto en 2024 okazos en Tanzanio. Mi havas multajn agrablajn memorojn de tiu lando. La jarojn 1986 ĝis 1989 mi estis instruisto en meza lernejo en Morogoro.

Sed tio estis alia tempo, alia epoko. Multe ŝanĝiĝis dum la 34 jaroj, kiuj pasis. Verŝajne porteblaj telefonoj estas kutimaj nuntempe – miatepe eĉ senmovaj telefonoj estis tre raraj. Kiom validas miaj memoroj, miaj iluzioj?

Mi scias, ke ne ĉio fariĝis moderneca dum la jaroj. Ekzemple dum la kovima pandemio, kiam aliaj landoj raportis kreskantajn nombrojn de malsanuloj, en Tanzanio estis preskaŭ neniuj kazoj. La kaŭzo estis, ke kuracistoj en Tanzanio estis laŭleĝe malpermesitaj diagnozi pacientojn kiel infektitaj de tiu nova viruso, ĉar la prezidento havis la ideon, ke pandemio ne povus afekti di-kredeman kaj pian popolon, kiel la tanzanian. Kaj la demokratiaj strukturoj de la lando estis tro malfortaj por bari liajn decidojn. Lia decido estis: Ne diagnozu, ne raportu. Nur kiam la prezidento mortis en la jaro 2021 Tanzanio ekaplikis pli normalan politikon pri infekto-protekto.

En 1986 kiam mi venis al Dar es Salaam, mi estis preparita, ke mi renkontos kulturon kaj

situacion tre nekutiman por mi – tiutempe vojaĝantoj al Afriko normale sintenis tiel: ke en alia lando ĉio ajn povas okazi. Do, mi ne surpriziĝis, ke la butikoj havis neniam varojn. La lando estis bankrota. Kiel multaj afrikaj landoj ĝiaj ŝuldoj fariĝis neteneblaj, kiam la mondaj prezo de petrolo kaj de dolaroj kreskis samtempe.

Pro tio kompreneble mankis importitaj varoj kiel kolbasoj kaj fromaĝoj. Ankaŭ enlandaj produktoj mankis, kiel pano, lakto, kafo, sukero, faruno. Dum periodo benzino ne ekzistis. Neniuj aŭtobusoj aŭ aŭtoj moviĝis en la tuta lando. Nur iuj raraj armeaj transportiloj ankoraŭ havis iom da fuelo. Tio okazis dum la antaŭaj monatoj. Kiam mi alvenis, iom jam ŝanĝiĝis: Post komplika disputo kun la Monda Banko, Tanzanio ĵus estis akceptinta drakonajn kondiĉojn por havi krediton por solvi la situacion, kaj petroliŝipo tuj venis al la haveno de Dar es Salaam, kaj benzino estis liverita al benzin-stacioj de la lando. Mi tial povis vojaĝi per aŭtobuso al la regiono Morogoro, kie mi estis laboronta.

Sed nur malmultaj tanzanianoj povis vojaĝi. La programo por ekonomia restrukturigo estis treege severa kaj daŭris longe: Dum dek jaroj la inflacio estis ĉiam ĉirkaŭ 30%. Multaj homoj perdis sian laboron. Ŝtadungitoj forlasis siajn laborojn, ĉar la salajroj ne sufiĉis

por vivteni sin. Ili provis perlabori kiel taksiŝoforoj aŭ vendistoj en la neformala merkato anstataŭe.

Por mi persone tiu tragika situacio ne gravis multe, ĉar mi vojaĝis al ejo por sudafrikaj rifuĝintoj kaj tie mi loĝis dum pli ol du jaroj. Tie ni ne praktikis monan ekonomion. Nur malofte, kiam mi forlasis la rifuĝejon, mi povis observi, ke evidente nova ŝipo estis veninta el iu alia lando, ĉar butikoj, kiuj kutimis esti malplenaj, subite estis plenaj – ĉiuj per la samaj varoj. Unue ĉiuj havis nur plastajn matracojn, tiom multajn, ke sur la trotuaroj troviĝis altaj stakoj.

La sekvantan monaton ĉiuj butikoj estis plenaj de plastaj siteloj. Kun la tempo la sortimentoj fariĝis pli diversaj, kaj post du jaroj la butikoj eĉ specialiĝis, kaj fariĝis: teksaĵovendejo, nutraĵovendejo, feraĵovendejo ktp respektive.

La rifuĝejo estis eksa sisalo-plantejo, donita de la tanzania ŝtato al ANC, sudafrika organizo por liberigi Sudafrikon de la apartisma reĝimo. Post la ribelo de sudafrikaj lernantoj en Soweto en la jaro 1976 multaj junuloj eskapis el sia lando. ANC en ekzilo konstruis sur la sisal-plantejo lernejon, kaj ankaŭ laborejojn por ligna, metala, elektronika kaj plumbista teknikoj, kaj ĝardenojn, bovinejon kaj porkejon.

Kiam opreso kreskis en Sudafriko, pli kaj pli da infanoj pro sia infaneca riskemo devis rifuĝi al Tanzanio. La plenkreskaj rifuĝintoj ne plu sufiĉis por la bezono de la lernejo. Tiam ANC varbis min kaj dekajn aliajn alilandanojn. Plej multaj el ni estis instruistoj. Ni venis de Niĝerio, Ganao, Usono, Britujo, Orienta Germanio, Finnlando, Nederlando, Aŭstralio kaj aliaj landoj. El Svedujo antaŭ mi venis arkitekto, kiu kune kun sudafrika arkitekto kaj konstruistoj konstruis multajn modernajn domojn por la lernejo, por la staloj kaj la kliniko, kaj por loĝigi ĉiujn kelkmilajn personojn. Mi loĝis en unufamilia domo kune

kun familio kaj kelkaj aliaj sudafrikaj personoj.

Mi kaj miaj studentoj ne devis zorgi multe pri kio estis ekster la rifuĝejo. Nin ne trafis la grava ekonomia situacio de la lando Tanzanio. Nia komunaĵo havis sian propran terkulturon. Trifoje semajne aŭdiĝis ŝarĝaŭto halti kaj hupi kaj ni ĉiuj el la apudaj domoj venis kun niaj pelvoj kaj kaseroloj kaj ricevis nian difiintan kvanton por la semajno: certan tagon ni havis porkon, alian tagon legomojn kaj fruktojn, kaj trian tagon farunon, fabojn, konservaĵojn, sapon aŭ aliajn necesaĵojn. Konservskatoloj venis de multaj landoj. Tra la tuta mondo homoj volis helpi kontraŭi la sudafrika apartismo. De Norvegio venis konfitaĵo, de Danio kolbasoj, de Finnlando fromaĝo, se mi korekte rememoras. De Sovet-Unio venis ladojn da viando kaj fiŝo.

Tiaj varoj ni do ricevis de la planko de la ŝargoaŭto ĉiun semajnon. Vestoj, senditaj de Emmaus Björkå kaj la Västerås-a organizo "La pano kaj la fiŝoj", estis distribuitaj alimaniere: Unue kelkaj konfiditaj personoj malfermis la kunpremitajn pakegojn kaj aranĝis la miksitajn enhavon sur vestarkojn: porviraj kaj porvirinaj aparte; jupoj, pantalonoj, ĉemizoj laŭmezure. Nur strikte klasope la studentoj rajtis eniri por trovi taŭgajn vestaĵojn por si. Alikaze estus risko, ke ĥaoso okazus, se ĉiuj trapuŝus sin antaŭen por havi la plej dezirindan vestaĵon.

Ĉu do ĉio estis bona en tiu ekonomia oazo en Tanzanio? Kompreneble ne. Multaj el la junuloj venis al tiu nekonata lando Tanzanio sen siaj familioj. Kelkaj eĉ ne havis tempon por informi siajn gepatrojn, kien ili foriris, ĉar ili havis la policon post si.

En ekzilo, ili eble unue pensis, ke nun ili volas preni aŭtomatan pafilon kaj reveni hejmen kiel batalanto kaj liberigi Sudafrikon. Sed ili renkontis la rektoron kaj la instruistojn kaj aliajn oficistojn de ANC, kiuj diris: Ne, ne fariĝu militisto. Vi devas studi, ĉar la venonta

liberigota Sudafriko bezonas kompetentajn personojn por anstataŭi la nunajn apartismajn oficistojn. Ankoraŭ vi nur povas organizi lerneajn strikojn. Tio estas bone, sed ne sufiĉas. Studu, studu.

Ne ĉiuj kapablis studi diligente. Post jaroj de strikado kaj politika aktivismo iliaj lerneaj scioj ofte estis nesufiĉaj. Nun kiam la eblo por studi venis, ankaŭ hejmsopiro kaj doloraj pensoj venis. Ili observis la ĉirkaŭan Tanzanion. Ĝi aspektis timige mizera kaj stranga. Ili observis la plenkreskajn ANC-anojn. Luj el ili ekziliĝis jam en la 70-aj jaroj, aŭ la 60-aj, eĉ dum la 50-aj jaroj, kaj la junuloj ekpensis: "Ĉu ankaŭ mi restos jaron post jaro sur tiu ĉi sun-ardega, malario-detruita sisal-plantejo."



"Libereco en nia vivo" estis slogano. Sed ĉu oni vere kuraĝis kredi tion? Mi almenaŭ havis la eblon revidi mian hejmlandon, sed por la sudafrikanoj eĉ tiu espero ŝajnis iluzia.

Sed la tago venis. La studentoj havis sian novaĵkomitaton, kiu ĉiun vesperon aŭskultis radio-novaĵojn el variaj landoj kaj resumis ilin en la granda halo post la studohoro. La

Aldono de Siv:

Kiam ĝeneralaj elektoj estis okazigitaj en aprilo 1994 en Sudafriko kaj la rasapartismaj leĝoj estis aboliciitaj, politika libereco estis gajnita ĉie en suda Afriko.

La jaro 1994 do estis la finpunkto por la rakontoj de ĉi tiu libro pri la afrikaj grupoj en Svedio. Multaj daŭre laboras por suda Afriko. Ĉi tiu libro temas pri kiel ĝi komenciĝis. Ĝi estas skribita de aktivuloj, kiuj estis tie.



"Kiam la libereco de Suda Afriko estis la nia."

komitato foje informis pri interesaj onidiroj el Sudafriko, ĉiam pli persistaj. Oni diris pri sekretaj interkonsiliĝoj inter ANC kaj progresemaj industriistoj, pri deklaroj de tradiciaj estroj, de sindikataj federacioj kaj fine pri renkontiĝo kun reprezentantoj de la sudafrika registaro.

Monatoj pasis, monatoj de espero kaj malespero – ĝis aperis afiŝoj en nia rifuĝejo kun nomoj de kelkaj personoj, kiuj rajtis reiri al sia hejmlando sen riski punon. Unue la rektoro kaj kelkaj oficistoj forvojaĝis. Ili estis necesaj por aranĝi la repatrujigon de ĉiuj aliaj. Estis necese trovi parencojn, lokon aŭ okupon en Sudafriko por miloj da personoj, kiuj longe estis for. Luj el la oficistoj estis bezonataj por la preparo por la elekto, la unua tutnacia elekto en Sudafriko, elekto por decidi pri la nova konstitucio.

Kiam Nelson Mandela, la ANC-estro estis liberigita el prizono kaj venis al la tanzania rifuĝejo por danki la anojn, mi ne plu estis tie. Poste ankaŭ ĉiuj studentoj povis reveni hejmen kaj post ankoraŭ kelkaj jaroj la apartisma sistemo malaperis.

La tanzanianoj, kiuj malgraŭ propraj problemoj dum jarcentoj kapablis apogi siajn sudafrikajn kunbatalantojn, nun havas aliajn revojn kaj aliajn batalojn.

Carl-Olof Selenius

När allmänna val hölls i april 1994 i Sydafrika och apartheidlagarna slopades hade den politiska friheten vunnits i hela södra Afrika.

År 1994 blev därför slutpunkten för denna boks berättelser om Afrikagrupperna i Sverige. Många fortsätter att arbeta för södra Afrika. Denna bok handlar om hur det började. Den är skriven av aktivister som var med.



Lumo, revuo eldonata en Kebeko

Inga Johansson rakontas

Ĉio komenciĝis kiam mi vidis filmon en la retpaĝo de Språkförsvaret (lingva defendo), kiu temis pri la franca lingvo en Kebeko, Kanado. Mi volis scii pli pri la LUMO kaj skribis al la gazeto:

– Mi trovis jenan filmon en sveda lingva blogo ĉe Språkförsvaret:

https://www.youtube.com/watch?v=EcJu_f2uPDC

Mi havas kelkajn demandojn:

- Eble estas subteksto en esperanto por tiu grava informo?
- Kiel fartas esperanto nun en Kebeko?
- Eble esperanto estu gvida ponto inter la angla kaj franca?

Poste mi ricevis respondon kaj ankaŭ la ligilon al la revuo Lumo.

Jen la respondo:

– Saluton Inga,

Dankon pro la ligilo al tiu video, kaj viaj demandoj. Kiel denaska angloparolanto kiu

loĝas ekster Kebekio, eble mi ne kapablas doni perfektajn respondojn. Tamen, ekzistas diversaj opinioj rilate al la malkresko de la francparolantaro de Kebekio, ekz:

<https://www.youtube.com/watch?v=FEdR6vy-gV8>

– Supozeble iu, ekz. vi, kiu ekhavas la rajton subtitoligi la videon esperantlingven, povus fari tion. Ĝis nun por tiu video mi vidas la eblecon montri subtitolojn nur anglalingvajn.

– En la provinco de Kebekio loĝas "relative" multaj esperantistoj, kompare kun la cetero de Kanado. Tamen, estas nur preskaŭ 110 aktualaj membroj de KEA, la Kanada Esperanto-Asocio, kaj mi ne scias kiom da membroj havas ESK, la Esperanto-Societo Kebekia. Kelkaj el la kebekiaj esperantistoj estas tre lertaj kaj laboremaj, kaj pro tio okazis la pasintjara Universala Kongreso (UK) de Esperanto en Montrealo. Eĉ en la ĉefurbo, Kebeko (aŭ Kebekurbo), estas kelkaj.

– Antaŭ 40–50 jaroj, oni demandis en perpoŝta kurso, ĉu oni uzu Esperanton kiel

pontolingvon inter angloparolantoj kaj francparolantoj en Kanado. Tion mi mem jam delonge faras. Tamen, oficialigo de tia strategio plej verŝajne neniam anstataŭigos aŭ eĉ aldoniĝos al la baza instruado de la alia el la 2 oficialaj lingvoj de la lando.

Amike,
Bob Williamson, Sekretario de KEA

Kaj respondo el Kebeko:

– Saluton Inga (kaj Bob!),

Se vi permesos, ke mi aldonu al la jam tre taŭga respondo de Bob (kun interesa ligilo al jutuba videaĵo, kiun ankaŭ mi rekomendas), jen miaj komentoj:

Pri Esperanto, mi supozas, ke ĝi estas, kiel en multaj landoj, en transiro, kun multe da reta agado ktp. Tamen, feliĉe, plu daŭras ĉeestaj kunvenoj en multaj lokoj (ekz. en Montrealo, kiujn mi mem kutimas partopreni), kaj tie oni povas renkonti homojn kaj junaĝajn kaj malpli junaĝajn. Se vi scipovas legi la francan (aŭ se vi bezonos, uzu komputilan tradukilon por ekhavi ideon pri la enhavo), mi rekomendas la jenan artikolon pri la Esperantistoj de Montrealo, kiu aperis pasintprintempe:

<https://urbania.ca/article/une-biere-avec-la-communaute-esperanto-de-montrealo>

Pri la franca en Kebekio kaj en la cetero de Kanado, nu, jen interesa sed kompleksa temo. Mi mem origine esperantistiĝis pro kialoj ligataj al tiu temaro. Kvankam iuj statistikaĵoj estas zorgigaj, la situacio estas certe plurflanka. Kio pri la estonteco? Nu, se oni rigardas longdaŭran historion, la lingvo estas nun – ĝenerale – pli sekura ol dum aliaj epokoj, kaj mi mem emas al – prudenta – optimismo.

Se vi permesos iom da memreklamado, mi verkis por la plej freŝa eldono de nia revuo "Lumo" artikolon ĝuste pri tiu temo (en Esperanto, de la paĝo 54):

https://esperanto.ca/wp-content/uploads/2023/07/Lumo_2023_1-fina.pdf

En tiu eldono de "Lumo" aperas ankaŭ pluraj artikoloj (inkluzive de artikolo de Bob pri sia loka klubo!), kiuj atestas la relative bonan viklecon de la kanada Esperantistaro. Oni certe ĉiam povas deziri eĉ pli favoran situacion, sed ni tamen fieras, kiel skribite de Bob, ke ni sukcesis, helpe de UEA kaj aliaj, okazigi la pasintjaran UK-n (malgraŭ sufiĉe multaj defioj). Se vi ne partoprenis tiun kongreson, mi rekomendas la jenan videan raporton:

<https://www.youtube.com/watch?v=PePfs63wLIQ>

Amike,
Nicolas Viau

Aldono el Interreto:

Lumo: 120-jara (nun 121-jara)

"Pri–Per–Pro–Por Esperanto". Sub tiu ĉi slogano, en Montrealo, **en januaro 1902, aperis la unua numero de La Lumo**, kiel posteulo de La Kanada Esperantisto (Espérantiste Canadien). Ĝi aperis kun la sama bela bildo de la knabino, tenanta ampolon (filino de unu el pioniroj de la frua tempo). **La revuo estis trilingva: franca-Esperanta-angla**, kun belaj bildoj kaj varia enhavo (novaĵoj lokaj kaj mondaj, korespondpetoj, lecionoj kaj ekzercoj, vortaro, propagandaj artikoloj, artikoloj por virinoj). La revuo dormis de 1904 ĝis la 1960-aj jaroj. Indas festi la 120-jariĝon, kaj daŭran pri-Lumadon de la Movado en Kanado kaj tutmonde! La arkivo de La Lumo baldaŭ troviĝos en biblioteko.ca. Sed kio pri la muzik-notoj sur la kovrilo? Jes, temas pri La Espero – sed ne tiu, pri kiu vi eble nun pensas! Estas alia versio, de eĉ pli frua tempo, ol tiu, kiu fariĝis nia oficiala himno. Estas komponaĵo de Claes Adelsköld, el Svedio. Li komponis tiun ĉi version en 1891. Aŭskultu ĝin ĉi tie: mallonge.net/FruaEspero.

Lumo Redaktoro: Ĵenja Amis. Provlegistoj kaj helpantoj: Bob Williamson, Francisko Lorrain.

Lumo nur eldoniĝas 1–2-foje jare, sed la numero de 2022, speco de katalogo pri la UK en Montrealo, enhavis 92 paĝojn.

/Siv

| | | |
|---|---|-----------------|
|  | <h1>PENSEO</h1> | <i>N-ro 382</i> |
| | Monata Beletra Revueto en Esperanto Honorita de Premio Grabowski, 1994 | |
| <small>Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 34-a jaro http://www.elerno.cn/penseo/penlisto.htm</small> | | |

El Penseo, monata revuo pri poemoj

eldonata en Ĉinio de **Veido**, kiu kolektas poemojn el la tuta mondo

Bonan Esperantotagon!

de *Rita Mkrtĉjan* el Armenio

Li havis belan verdan tason,
Per kiu verdan teon trinkis
Per la skribilo, ankaŭ verda
Apud la tablo ion skribis.

Pentraĵo bela apud lito
Kun vojo verda, verda kampo
Kaj kiel stel' lumigis ĉambron
Per verda lumo eta lampo.

Forflugis jaroj, temp' trapasis
Li rememoris kun tenero
La tuta viv' ne estis "verda",
Sed hom' ne vivas sen espero.

Ne estis el alia planedo,
Ne estis stranga vivekzisto,
Memorinsignojn verdajn gardas
Kun "verda" kor' Esperantisto!

Yi Qiao (Ĉino en Germanio)

– laŭ ĉinesko Belulino Yu*

La luno jen tenere
klaras vespere.
Sopiras kare al vi,
mi suspirante kun nostalgi'.
Delonge ni apartas,
kiel vi fartas?
Mia kora bondezir'
vin benas kun amika aspir'.



* Belulino Yu (ĉine: Yumeiren) ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po kvar versoj de 7,5; 7,9; /

La avantaĝoj de Linukso

de Espoir Kazati, DR Kongo

Espoir Kazati el DR Kongo faris Power Point-raporton pri siaj studoj en la universitato de Lumbumbaŝi. Mi nur kaptis lian **raporton pri Linukso**. La tuto estas tro longa por Ora Ĵurnalo. Jen ĝi per Guglo tradukita el la franca. La franca ŝajne estas la ĉefa lingvo de la universitato de Lumbumbaŝi, DR Kongo:



1. Plena Aliro: La fakto ke Linukso estas sub la Publika Permesilo GNU garantias ke uzantoj (de ajna tipo) povas havi aliron (kaj modif-raĵojn) al la kodo ĝis la kerno, kiu funkcias kiel la fundamento de la Linukso OS.

2. Libereco de Licenco: kun GPL-licencita Linuksa OS, vi estas libera modifi tiun programaron kaj uzi ĝin, eĉ reldoni ĝin aŭ vendi ĝin (kondiĉe ke vi disponigas la kodon).

3. Reta subteno provizita de la uzantgrupo: kun Linukso vi havas subtenon danke al grandega komunumo, per forumoj, serĉiloj kaj multaj fakaj retejoj.

4. Plena Aparataro de Subteno: Ĉi tio estas punkto, kiu iom post iom malaperas, antaŭ jaroj, se vi instalas Linukso sur maŝino, vi devis certigi, ke vi elektos ĉiun pecon ĝuste, alie via instalado ne funkcios 100%.

5. Komandlinio.

6. Instalado de centralizitaj aplikoj: Sub Linukso ni havas centran lokon kie ni povas aldoni, forigi, serĉi programaron, ni parolas pri pakajmastruma sistemo.



Bonaj novaĵoj de DR Kongo skribas Amnesty International, Svedio

Multaj surskribis protestlistojn, kiam la aktivistoj por homaj rajtoj, Elias Bizimungu kaj King Mwamisyu, estis arestitaj.

Elias estis absolvita fine de majo, kaj la advokato de King esperas ke baldaŭ ankaŭ King estos libera.

Indas apogi Amnesty! /Siv

La monstro en la Grandlago – Odjuret i Storsjön

Pri sveda fenomeno aŭ turista alloganto – la monstro en Storsjön proksime al Östersund, Svedio, skribas **Walter Klag**, Aŭstrio:

En la libro **”Runstenar in Sverige”** de Linus Karlén, mi trovis informojn pri la Monstro en Grandlago (Odjuret i Storsjön). Tiu lago estas la kvina plej granda en Svedio kaj situas pli norde ol Stokholmo.

Multaj asertis, ke ili vidis tiun monstron. Ĝi estas laŭdire vermoforma, havas kapon kiel hundo kaj skvaman haŭton. Por esplori la fenomenon, oni jam ofte klopodis kapti tiun beston, sed vane. Iam oni volis protekti ĝin kiel naturan monumenton, sed tio ne eblas, ĉar oni ne scias, pri kiu specio temas. La diskutado daŭras.

La regiono ĉirkaŭ Storsjön estas maldense loĝata. Povas esti nur bone, se venas multaj



Bilde de Unga Faakta. Mysterier.

turistoj tien. Eble iu inventis la monstron por instigi la turismon. Ankaŭ en Skotlando ĉiusomere – ekde 90 jaroj – aperas artikoloj pri la monstro de Loch Ness. Ankaŭ tie la turismo profitas de tiu fantazia fantomo.

<https://sv.wikipedia.org/wiki/Storsj%C3%B6djuret>

Verkis Walter Klag. Korektis Renate Klag.

Malgranda ŝterno – Småtärna

de Renate Säfström



Malgranda ŝterno, somera gasto el Afriko – Småtärna, sommargäst från Afrika.

La intereso pri Esperanto kompare kun pri la klimato

La plej lastan statistikon trovis **Walter Klag** – en la sveda (ĉi tie tradukita):

Periodo: 2023-05-01 – 2023-07-30

Observo: ĉiutage

Projekto: sv.wikipedia.org



Ĉu oni povas fidi la statistikon? 😊 /Siv

| Paĝtitolo | Montroj | Taga averaĝo | Redaktoj | Redaktantoj | Grandeco |
|---|---------------|--------------|----------|-------------|----------------|
| Esperanto | 15 269 | 168 | <u>0</u> | 0 | 89 091 |
| Klimato | 2 014 | 22 | <u>1</u> | 1 | 21 543 |
| Lernejstriko por la klimato | 1 578 | 17 | <u>0</u> | 0 | 13 823 |
| 3 paĝoj | 18 861 | 207 | 1 | 1 | 124 457 |

Aldono: Wikipedio kaj Esperanto

https://pageviews.wmcloud.org/?project=it.wikipedia.org&platform=all-access&agent=user&redirects=0&range=latest-30&pages=Esperanto|Climat|Cambiamento_climatico|Clima

Socia evoluo?

de Roger Nilsson



Ĉu ni estas survoje al la sama katastrofo kiel la musoj?

"Universo 25" aŭ "Universum 25" estis eksperimento, kiu estis unu el la pli teruraj en la historio de la scienco, kie oni provis klarigi homajn sociojn per kolonio de musoj. La ideo de "Universo 25" venis de usona sciencisto nomita John Calhoun, kiu kreis la "idealan mondon". Pli specife, ĝi estis la "paradizo de la musoj".

En ĉi tiu paradizo ili havis manĝaĵon, akvon kaj spacon. Okazis, ke ili multiĝis dum la sekvaj 315 tagoj. Post tio, reproduktado komencis malpliigi draste. Kiam post 315 tagoj ili atingis 600 musojn, hierarkio komencis esti kreita. Kelkaj musoj staris super la aliaj musoj, ni nomu ilin alfa-musoj kaj beta-musoj. La pli grandaj musoj komencis ataki la grupon, kio kondukis al multaj maskloj komencante psikologie "rompiĝi".


Kiel rezulto, la inoj ne estis devigitaj protekti sin, kaj iĝis agresemaj direkte al siaj idoj. Kun

la paso de la tempo, la inoj montris pli kaj pli agreseman konduton, izolitecon kaj malemon reproduktiĝi. Estis malalta naskoprocento, kaj samtempe, pliigita infana malsaneco. La bebaj musoj mortis. Poste venis nova klaso de maskloj, la tiel nomataj belaj maskloj.

Ili rifuzis reproduktiĝi kaj batali por sia teritorio. Ili nur zorgis pri manĝaĵo kaj dormo. Post iom da tempo tiuj belaj maskloj kaj izolitaj inoj fariĝis plimulto de la loĝantaro. Kun la paso de la tempo, infana morteco iris al 100% kaj reproduktado al nulo. Ĉe ĉiuj pluivaj musoj, samseksemo estis observita, same kun kanibalismo, kvankam manĝaĵo daŭre estis abunda. Du jarojn post kiam la eksperimento komenciĝis, la lasta muso naskiĝis. En 1973, ĉiuj musoj en la kolonio estis mortaj. John Calhoun ripetis la eksperimenton 25 fojojn, kaj ĉiufoje kun la sama rezulto.

Ĉi tiu scienca eltrovaĵo estas uzata por antaŭdiri socian kolapson kaj ĉi tiu esplorado disponigas fokuson por urba sociologio.

Ŝerco inter sciencistoj



Fizikisto en aŭto respondas al la polico, kiu haltigis lin:
"Vi diras ke vi mezuris mian rapidecon je 130 km hore. Do, mi estas perdita, mi ne plu scias kie mi estas."



ZEOJ

ZEO = Zamenhof- aŭ Esperanto-Objekto

Ekz: **ŝtono en Sopot, Pollando**, memorigo pri la esperantoj kongresoj en 1927 kaj 1959.

Teksto sur la ŝtono:

1.8.1927 dum la 19-a Universala Kongreso de Esperanto ĉi tie estis plantita JUBILEA KVERKO, kiun poste faŝista reĝimo detruis.



Krome en la sama loko: **esperanto-kverko**.

Kverko replantita dum la 15-a Internacia Junulara Kunveno de TEJO, 26.7.1959.

Rekordoj pri ZEOJ:

- **La plej alta:** la Zamenhof-monumento je 12 metroj, starigita en 1959 en Sabadeli, Hispanio
- **La plej longa:** La kvarkilometra Esperanto-strato en San Sebastiano do Cai, Brazilo
- **La plej nordaj:** Esperanto-monumento en Narvik, Norvegio
Esperanta Creek (rivereto) en Alasko, Usono
Cape Esperanto, (terpinto) Svalbard, Norvegio
- **La plej sudaj:** Esperanto-arbo en Tasmanio, Aŭstralio
Zamenhof-monumento kaj Esperanta strato en Mar del Plata, Argentino
Zamenhofstrato en Port Elizabeth, Sud-Afriko
Esperanto-insulo en Antarkto
- **La plej foraj:** La asteroidoj 1462 Zamenhof kaj 1421 Esperanto Epigrafoj en Esperanto portitaj de Voyager 1 kaj Voyager 2 je ilia vojaĝo for de la sunsistemo /Siv

Supo en la benzinujo – Soppa i tanken

de Lasse Granat

Iun tagon ni estis irontaj al Mjölby. La aŭto funkciis iom malbone lastatempe, sed ni devis iri. La sparkado povus komenci maltrafi sur grandaj suprendeklivoj, precipe se estis malseka ekstere.

Estis tre humide en tiu tago, forta pluvego. Estis tiel nuba, ke ŝajnis esti malfrua vespero kvankam estis mateno. Ingegerd, Christin kaj

En dag skulle vi åka till Mjölby. Bilen hade gått lite halvknackigt på sistone, men vi var tvungna att åka. Den kunde börja misstända i stora uppförsbackar, särskilt om det var fuktigt ute.

Det var mycket fuktigt denna dag, ett kraftigt ösregn. Det var så mulet att det verkade vara sen kväll fast det var förmiddag. Ingegerd,

mi, plus nia hundo Mille, estis vizitontaj la fraton de Ingegerd, Karl-Henry, kiu estis tre malsana.

En la longaj suprendeklivoj ĉirkaŭ Borås kaj Ulricehamn mi foje devis ŝanĝi la rapidumon al la kvara kaj eĉ la tria por povi supreniri. Poste restis nur la supreniroj ĝis Brahehus ĉe Gränna. Post tie estos pli ebena.

Ni finfine alvenis, la aŭto marŝis sufiĉe bone. Post la vizito al Karl-Henry, estis vespermanĝo en la hejmo de Salme, kunvivanto de Karl-Henry.

Kiam vesperiĝis estis tempo iri hejmen. Mi pensis, ke la vojo kliniĝos malsupren la unuajn cent kilometrojn ĝis Jönköping kaj de tie estos pli facile daŭrigi hejmen se la aŭto strikus.

